FENIKSO



INFORMILO POR
AMIKA
RONDO DE
ESPERANTAĴ-
KOLEKTANTOJ

Redaktas: R. Jensen, Sdr. Ringg. 77, DK-8000. Århus C

Nr. 10. Majo 1970 Dua jaro nr. 5

## NOV-ZELANDA ENIGMO SOLVITA

En sia letero de 4/2 1970 nia nestoro, Franz Mayer, inter alie skribis al mi: Antaŭ nelonge mi ricevis ekzempleron de kat. nr. 720 (33-a kgr. en Whangarei 8 - 12/1 1968) kaj samtempe ekzempleron, kiu estas tute simila en bildo sed kun la teksto: 32 - a kgr. Jan. 9-15, 1968, Whangarei. - Marko kiu estas indikita nek en via katalogo, nek en "Fenikso". - Estas strange ke oni - laŭ tio - okazigis la 33-an eĉ unu tagon pli frue ol la 32-an en la sama loko.
Ĉu vi jam havas scion pri tiu mistero?

Ne, mi ne sciis ion pri tio, sed mia scivolemo pri la historio, kiu ŝajne kreis la mistikon, kreskis tiom, ke mi fine devus skribi al eldonanto en Nov-Zelando demandante pri eventuelaj detaloj. Kompreneble mi tuj komprenis, ke devus temi pri eraro, ĉar la 32-a kgr. ja okazis en 1967, kaj tial oni ja ne povus okazigi ĝin denove en 1968.

La 17-an de aprilo mi ricevis ĝentilan respondon de la fora insulo sur la alia flanko







de la terglobo. La administrantino de libro-servo de NEZA, s-ino Colleen M. Larsen, i. a. skribis:

"Jes! ni dissendis la glumarkojn por la 33-a kongreso tuj kiam ni ricevis ilin de la pres-ejo, - kaj nur poste ni rimarkis, ke la pres-isto ja faris 2 gravajn erarojn. - Terure! Do ni devis rapide presigi novan stokon, ĉifoje kun la ĝustaj datoj kaj kongresnumero. Sed mul-taj el la eraraj estis jam uzitaj kaj ne resen-ditaj por ŝanĝo kontraŭ la novaj, ĝustaj. -

Ĉar vi interesiĝas, mi sendas al vi plurajn foliojn de la ne-ĝusta marko kaj folion de la ĝusta. Eble vi povos transdoni ilin al aliaj, kiuj deziras havi ilin en siaj kolektoj. Post nelonge aperos la nova glumarko por la 36a NZ-kongreso okazonta en Auckland. La markoj ĉi-foje estos en libretoj anstataŭ folioj, kaj ili kostas 10 cendoj por ĉiu libreto (24 glm.) -

(Kolektantoj, kiuj aĉetos la novan glumar-kon, certe povos laŭ deziro pri tio samtempe ri-cevi folion de la erara 1968-marko senpage. La adreso estas: N Z Esperanto Association,

George Bolt Drive, Mangere, Auckland, Nov Zelando). (Red.)

-

Nun mi jam faris kliŝon de la koncernaj glumarkoj por notico en nia klubgazeto, - sed plie dank'al la komplezo de s-ino Colleen M. Larsen, mi ankaŭ povas enmeti ekzempleron de la erara marko al ĉiu membro.

Ĉar tiu marko laŭ la raporto de Nov Zelando siatempe vere estis distribuita kaj parte uzita, ni ja fakte devus kalkuli kun ĝi en niaj kolektoj, - kaj en venonta katalog-aldono mi katalogos ĝin - same kiel farita je la simila afero en Budapest pri 51-a UK. (vidu nr. 689x)

Reinhold Jensen

## VIOLA STAMPO DE GYULA 1969

Kiel konate oni en la hungara urbo Gyula ĉiun jaron aranĝas "Someran Esperanto-Universitaton" SEU. Entrepreno kiu jaron post jaro vekas pli grandan atenton kaj estimon.

Por ni "inkarnitaj" kolektantoj la plej interesa flanko de tiu grava okazaĵo tamen estas ĝia eldonigo de poŝtstampoj kaj glumarkoj.

Tiuj eldonigoj komencis je la 5-a SEU en 1967.

La poŝta stampilo de 1967 havis la tekston en hungara kaj internacia lingvoj: 5-a Somera Esperanto Universitato.

La stampo de 1968 estis tute simila - nur kun la necesa ŝanĝo de la SEU-numero.

Kaj la stampo de 1969 daŭre estis same, nur ke oni tute forprenis la SEU-numeron, tiel ke malplena loko aperis sur la stampaĵo.

Sed je la 1969-stampo estas ankoraŭ grave diferenca fakto: ĝi aperis kaj en nigra kaj en viola koloroj.

Kiam mi ĉi jare hazarde ricevis la violan mi ekmiris; kaj tial mi tuj demandis al mia multjara kolektamiko D-ro Szemenyei, membro de la

komitato por SEU; kaj li respondis jene:
"Dum la malfermo de 7-a SEU (6.jul.) en kiu partoprenis ankaŭ la loka poŝtestro, funkciis porokaza poŝtoficejo en la antaŭĉambro de la salonego. Antaŭ la oficiala malfermo de la ekspedoj en la porokaza oficejo venis grupo de filmistoj, kiu volis fari kinofilmon pri la "unua stampo", kaj petis min (la poŝtestro), ke mi sidiĝu ĉe la tablo kaj propramane faru la unuan stampon. Mi akceptis la proponon, ricevis la porokazan stampilon por la 7-a SEU kaj violkoloran stampkusenon.

Nun mi faris la unuan stampon, kaj la filmistoj eternigis tiun scenon.

La poŝto uzis en tiu ejo dum la tuta malferma tago (6.jul.) la tiean violkoloran stampkusenon. Dum la venontaj tagoj (7-12.jul.) jam ne funkciis la poŝtaj ekspedoj tie, sed en la oficiala, urba poŝtejo, kiu situas vid-al-vide de tiu konstruaĵo en kiu okazas SEU. Kaj tie uzis la poŝto la ordinaran nigran stamp-kusenon por stampi la leterojn de SEU.

Do la violkolora stampado okazis la unuan tagon, kaj la nigrakolora stampado okazis dum la sekvintaj 6 tagoj."

Sekve de tiu klarigo oni devas rigardi la violajn stampojn kiel aŭtentikajn.

D-ro Szemenyei daŭrigis: Mi ankoraŭ ne sukcesis konstati la kaŭzon, kial oni ne en la stampilo metis la SEU-numeron (7-a) same kiel okazis pli frue je la 5-a kaj la 6-a SEU.

-

Eble la gravuristo ne havis tempon aŭ okazon por fari la necesan laboron pri la ŝanĝo. Nun ni kun scivolo atendas la venontan stampon por la 8-a SEU, ĉu ĝi havas numeron aŭ ne. Se ne, oni ja teorie povus uzi la saman stampilon je ĉiu SEU estonte.

Reinhold Jensen

8888
QQQQ

## TUTAĴ-ANGULETO

Al la demando en lasta numero pri hungara tutaĵo kun surpreso nia hungara membro D-ro V. Tóth respondis jene:

La hungara poŝtkarto kun surpresita teksto sur la poŝtmarko estis siatempe prave NE katalogita de s-ro G. Saget; ĉar ne temas pri nova tutaĵo. La surpreso (stampaĵo?) simple signifas: " Poŝtofica Servo".

Tre nature la poŝto ne afrankas siajn poŝtaĵojn servantajn oficialajn celojn.

En la ĉi tiea okazo la poŝto simple uzis tutaĵon, poŝtkarton kun enpresita poŝtmarko, kiun ĝi per streko neniigis, ĉar ĝi estis superflua. Kaj anstataŭ ĝi surstampis la oficialan signon por "Serv - poŝtaĵoj": "Póstaszolgálati ügy"="Poŝtofica Servo" , sekve ne afrankenda poŝtaĵo.

Mi esperas, ke mia noto sufiĉe klarigas la signifon de la surpreso.

Kun koraj, samideanaj salutoj

D-ro V. Tóth

## KIU KONAS SVISAJN TUTAĴOJN ?

ĈAR mi ĝis nun ne aŭdis pri ekzisto de E.tutaĵoj de Svisujo, mi estis tre surprezita, kiam mi ricevis flavetan pk.n kun surpresita 10 Rp poŝtmarko kaj teksto: "Svislando, la fama lando por la turismo invitas vin por la 32-a Universala Esperanto-Kongreso 1947 en Bern. 1887 - 60 JARA JUBILEO DE ESPERANTO - 1947. Maldekstre supre estas malgranda foto de pejzaĝo: Bürgenstock - Zentralschweiz. Tuta preso estas bruna. Laŭ la foto mi konkludas, ke verŝajne ekzistas serio de poŝtkartoj kun diversaj pejzaĝoj. Pluaj informoj certe interesus nin ĉiujn. Ĉu iu AREKANO povos raporti ion?

Frank Tichý

## S T A M P O J

Daŭrigo 1970

2) UNUA STAMPO EN MONACO ! Ekde 2-a marto uzas poŝtoficejo en Monte - Carlo varbstampon por 62-a franca E.kongreso, kiu okazos la 15-an ĝis la 19-an de majo 1970 en tiu urbo. La stampo similas al francaj varbstampoj el antaŭaj jaroj; maldekstre estas ronda tagstampo, dekstre rektangulo kun franca teksto pri la kongreso. Certe tiu stampo estos en la estonto tre serĉata. Niaj membroj ricevos ĝin en la Novaĵ-servo. (Lasta sciigo de Amouroux diras, ke ekzistas 2 variaĵoj: o ═ kaj ═ o. Red.)

3) Poznan 9 uzis la 8-an de marto stampon: "Internacia Tago de Virinoj". Teksto en pola kaj Esp. En la stampo estas portreto de famkonata pola aktorino H. Modrzejewska.

4) Aachen 1, Germanujo (DBR), estis loko por trilanda E.kongreso, germana, - nederlanda kaj franca, en tagoj 27. - 31. 3. 1970. Ronda tagstampo portas koncernan tekston.

Frank Tichý

## ANONCETO

Mi urĝe serĉas brazilan stampon BR 21. Rio de Janeiro 1959. Rekompence valoraj stampoj laŭ interkonsento. Frank Tichý, Slapanov 87. ĉe H. Brod. Ĉeĥoslovakio.

---

MALOFTAJ GLUMARKOJ

Mia anonco pri prunto de kelkaj glm por fotokopiado havis bonan rezulton. Mi ricevis 5-6 de la dezirataj markoj. Mi estas tre ĝoja pro tiu




signo pri helpemo. De kelkaj el la mal-oftaj mi faris kliŝojn, tiel ke mi en venontaj numeroj povas montri ilin por vi, ĉar mi kredas, ke ne estas nur mi, kiu povas havi ĝojon de pli eksakta scio pri tiuj unikaj glm. Hodiaŭ mi komencas kun nr. 351. Oni tuj miras pri la granda formato, tre nepraktika por glumarko. Kaj oni ekpensas, ke tiu marko eble tute ne estas glumarko, (ĝi ankaŭ ne estas gumita), sed reklamilo kun alia celo. Insigno, fenestro-afiŝo aŭ libra paĝo-signo. Almenaŭ oni dubas pri ĝi kiel glumarkon pro la grando kaj la vertikala formato, - tro granda por leteroj. Kaj kiel konate estis okaze de tiu konferenco eldonita alia, vera glumarko, kiu ne estas nomita en la katalogo pri porokazaj markoj pro tio, ke ĝi ne en la teksto montras rilaton al la konferenco. La teksto estas nur: Hungarlandaj Esperantistaj Fervojistoj. Hódmezövásárhely. La bildo montras E.stelon, stilizitan trajnon k.terglobon. Blua, flava kaj verda, (H)(36x25) trĉ. Tiu marko estas pli ofte vidita, kaj ankaŭ tio indikas, ke

la granda marko ne estis uzata kiel glumarko en korespondado.

Simila afero estas ĉe pluraj, grandaj markoj. Ekz. de la Budapesta Foiro. (155, A 163, 234, 247). Ili ne estas glumarkoj, sed reklamslipoj kun aliaj celoj, kaj tial ili ne devus esti kunprenitaj en la Glumark-katalogo. □

---

Ŝajne ni devos post la ferio daŭrigi la diskuton pri kiuj poŝtstampoj ni devas aprobi en niaj kolektoj. (katalogoj). Mia propra opinio estas ja, ke ni nur devus kalkuli kun tiuj sta. kiuj havas "filatelan rilaton" t. e. sta, kiuj servas je nuligado de la poŝtmarkoj. Bedaŭrinde jam ĉi tie ekestas konflikto rilate al la "apudstampoj", sed tiun grupon mi povas aprobi pro la multeco de ili kaj la oficiala uzo de ili. Sed aliaj stampoj, kiujn la poŝto uzas je la ekspedo, eĉ se ili havas E.tekston, mi proponas, ke ni ignoru en katalogo. Ili povas havi memorvaloron por Esperantistoj, sed ni devas teni ilin en aparta grupo, ne kune kun la filatela grupo. S-ro Burmeister skribis, ke li kontraŭe volas havi ĉiujn specojn de sta kun E.teksto en la katalogo, eĉ la Reko-stampoj kaj la brazilaj TP-stampoj. Pri stampaĵo farita per malnova, muzea stampilo li diras: Se oni stampas koverton kun poŝtmarko, tio simple estas trompo punenda. Alie se oni stampas sur paperpeco sen pm. Tia stampaĵo servas kiel specimeno kaj povas havi grandan valoron ekz. por katalogisto, - "filatelaĵo" ĝi ja ne estas. □

---

En la venontaj 3 somermonatoj ni ferios, -sed tio ne signifas ke ni ne laboras kun niaj kolekt-objektoj. Vojaĝontoj devas per malfermitaj okuloj "spioni" pri novaĵoj k.s. Kaj komprenebIe (ĉu ne?) ili skribos al Fenikso pri la rezultoj de iliaj esploroj. La venonta Fenikso aperos la 1-an de septembro esperebIe ŝvelanta de novaĵoj. Bonan Ferion! deziras la red. = □